Marie Hankel,

# Sankta nokto

Sankta nokto, luma hela,
Ĉiujare vi revenas,
Vi la vivon igas bela,
Vi la homojn ame benas.

Vi alportas belajn horojn
Al la familia rondo,
Vi ĝojigas homajn korojn
Ĉie en la vasta mondo.

Vi parolas pri la amo,
Pri kuraĝo kaj espero,
Ekbruliĝas nova flamo,
Nova lumo nun sur tero.

Sub la bela, verda stelo,
Sankta nokto, ni vin festas!
Nia ideala celo
Paco, amo, ĝojo estas!

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Marie Hankel *(nask. Dippe, ∗1844-02-02 – †1929-12-15).*

*Arg-477-925 (2008-09-24 15:48:59)*

*La poemon trovis s-ro Lars Kromann (Stenbrydervej 6, Værløse, DK4640 Fakse [lars.ev@get2net.dk]) en la malnova dana poem-libreto “La Verda Espero”, 2-a jarkolekto, decembro 1912, n-ro 10, eldonita de Aarhus Esperanto-Forening. Li sendis tiun rete al mi, Manfred Retzlaff, la 24an de Septembro 2008. Verŝajne ĝi estis prenita el la poem-kolekto “Sableroj”, siatempe eldonita de la aŭtorino Marie Hankel.*